

Komitato de ILEI en Busano, Koreio, okaze de la 50-a Kongreso de ILEI

Julio 2017

Unua kunsido lunde 10 :00 - 12 :30

Dua kunsido vendrede 9 :00 – 11 :00

PROTOKOLO

1. Bonvenigo. Ĉeestas nome de la Estraro Mireille Grosjean, Xiaofeng Gong « Arko », Elena Nadikova. El la Komitato Katalin Kovacs HU, Rob Moerbeek NL, Aurora Bute RO, Park Yongsung « Nema » KR, LI Hyonsuk « Jesa » KR, HAN Sugheui « Kristalo » KR, Stefan MacGill HU, Ruben Fernandez Asensio KAT, Isikawa Tiekō JP, Didier Janot FR, Duncan Charters, Usono, Ron Glossop, Usono, Marija Belošević HR.
Gastoj kaj observantoj (ne daŭre) Karine Arakeljan AM, Pradip Ghimire NP.
2. Akcepto de dokumentoj pri anstataŭigo de komitatanoj. Venis jenaj validaj paperaj rajtigiloj :
PARK Yongsung Nema, Koreio, anstataŭas LI Hyonsuk Kristalo. Koreio
PARK Yongsung, Koreio, anstataŭas HAN Sugheui, Koreio
LI Hyonsuk « Kristalo » anstataŭas PARK Yongsung « Nema », Koreio
GONG Xiaofeng Arko, Ĉinio, anstataŭas YU Jianchao, Ĉinio
Mireille Grosjean, Svislando, anstataŭas Jean-Thierry von Büren, Svislando
Aurora Bute, Rumanio, anstataŭas Mihai Trifoi, Rumanio
Aurora Bute, Rumanio, anstataŭas Nina Danylyuk, Ukrainio
Aurora Bute, Rumanio, anstataŭas Mikaelo Lineckij, Ukrainio
Didier Janot, Francio, anstataŭas Michel Déchy, Francio.
Noto : la 3 koreaj komitatanoj devis deĵori aliloke. Unu ĉeestis kaj reprezentis la du aliajn. Kiu ĉeestis, evoluis dum la semajno.
3. Informo pri la kvorumo. Ĝi estas atingita : 22 voĉoj.
4. Definitivigo de la tagordo. La tagordo estas aprobita.
5. Elekto de protokolantoj. Elektiĝas Ruban Fernandez Asensio, ĉefa, kun konsilanto Rob Moerbeek, kontrolanta.
6. Akcepto de la protokoloj en Nyiregyháza aprobita per 12 jesoĵoj, 10 sindetenoj (de tiuj personoj, kiuj ne ĉeestis en Hungario en 2016)
7. Resumo kaj konfirmo de komitataj decidoj en Nyiregyháza. La ĉefa decido en Ny. estis, ke *Juna Amiko* estu abonebla rete. Tio konkretiĝis.
8. Starigo de eventualaj dumkonferencaj komisionoj. Ne okazis.
9. Proponoj por Honoraj Membroj : HU Guozu kaj Paul GUBBINS. Unuanime elektitaj.
10. Informoj pri la laboro de la estraro. Kunsidoj per skajpo okazadas tra la jaro. Intensaj diskutoj kaj interŝanĝo de retaj informoj tra la jaro. Elena Nadikova efike zorgas pri la raportoj, kiuj disvastiĝas ĉiun trian monaton laŭ bone konata ritmo. Ŝi plie zorgas pri la kampo Esperanto-centroj. Radojica Petrović zorgas pri la Kongresoj, vizitas la lokon,

- subtenas la Lokan Kongresan Komitaton. Gong Xiaofeng « Arko » kaj Ivan Colling regule sekvas la diskutojn kaj donas valorajn opiniojn kaj sugestojn. Ni ĉiuj timis pri la sano de nia kasisto ; tamen William Harris tute vigle laboras post sia julia malsano ; liaj konsideroj pri la financa aspekto de iu agado de ILEi estas ĉiam trafaj. La prezidanto Mireille Grosjean sekvas la tuton, alvokas la Estraron kaj/aŭ la Komitaton laŭbezone, konsilas la sekciojn, zorgas pri informado al la Movado per regulaj artikoloj kaj informoj en la sociaj retoj. Ŝi plie atente observas la enhavon de IPR kaj de Juna Amiko, rilatas kun la redaktoroj kaj decidas pri la enhavo de IPR. Ŝi aktualigas la varbilojn pri ILEI kaj zorgas pri printado de ili. Ŝi estas en konstanta rilato kun UEA tra la pera laboro de Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA. Se venas ia deziro aŭ peto al ILEI, tio alvenas al ŝi kaj ŝi devas decidi, kiel trakti tion. Nuntempe abundas tiaj plej diversaj demandoj kaj petoj.
11. Informo pri evoluo de niaj sekcioj. Ne kandidatiĝas nova sekcio en 2017. Espereble en 2018 aperos Armenio, Rusio, Ĉilio.
 12. Vekado de la laborkomisionoj. A) Mirejo esploros en Hispanio, ĉu novaj profesoroj-esperantistoj povas stiri kaj vigligi la universitatan komisionon (Vicente Manzano, Carlos Espinola). B) Propono de Katalin Kovats: kreado de kunlabora grupo Edukado.net - ILEI por kompilado de listo de rekomendataj lerniloj; aprobita unuanime. ILEI alvoku sekciojn pri nacilingvaj lernolibroj. C) propono pri kreado de gradigata listo de rekomendataj legaĵoj; aprobita per 21 jeso kaj 1 sindeteno.
 13. Informoj pri subvencioj por la Kongreso. 5 personoj povis partopreni danke al subvencioj de ILEI.
 14. Ceteraj diskutendaj punktoj kun la estraro. La Komitato decidas stimuli la laboron de la komisiono pri statut-ŝanĝoj: unuanime akceptita.
 15. Elekta Komisiono, elektoj de la estraro en 2018. Ĝi ekzistas, ĝi konsistas el Zsófia Kóródy, Aŭrora Bute, Rob Moerbeek.
 16. Prezento kaj diskuto de la Jarraporto 2016. Aperas detala raporto ĉiun trian monaton. Ili legeblas en la retejo de ILEI.
 17. Voĉdono pri la financa raporto pri 2016. Financa raporto akceptita per 19 jeso, kun 3 sindetenoj
 18. Voĉdono pri la jarraporto pri 2016 kaj senŝarĝigo de la estraro. Jarraporto akceptita per 19 jeso, kun 3 sindetenoj . En tiu momento, marde fine de la unua kunsido, venas la propono nuligi la kunsidon de ĵaŭdo matene. La vendreda kunsido sufiĉos por fini la

- tagordon. Nuligo de ĵaŭda kunsido aprobita per 7 jesoĵ, 10 sindetenoĵ kaj 4 kontraŭaj voĉoĵ.
19. La *Jaro de la Lernanto*, komuna agado de UEA kaj ILEI, defio por ILEI. Mireĵo Grosjean raportas skize : Stefan MacGill kaj ŝi multe vojaĝis por prezenti la Jaron, prelegis ; MacGill kaj Grosjean partoprenis kune en 7 eventoj tra la mondo ; MacGill sola en 7, Grosjean sola en 2. Mireĵo Grosjean raportas pri la FilmFestivalo IPEFF, kiu estos la kerna programo de la merkreda vespero kun elekto de la filmo, kiu ricevos la Premion de la Publiĵo. Niaĵ 4 plej fortaj sekcioĵ estis prezentitaj en IPR. Kompletaj raportoj pri la Jaro estas en preparo kunlabore kun Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA.
 20. Informoj pri la Konferenco 2018. Salamanca kaj Sevilo rezignitaj pro manko de lokaj esperantistoj; venonta kongreso okazos en privata universitato en Madrido, antaŭ la UK. Antaŭ la komenco de la 51-a ILEI-kongreso okazos la tuthispana kongreso. Eblas partopreni ambaŭ eventojn kun rabato.
 21. UNESKO. Prezento de la observantaro. La ĝisnunaj observantoĵ petis novulojn por Unesko-konferencoj en Parizo; ne eblas repagi vojaĝkostojn al ili. Dokumentoj pri Emmanuel Desbrières, Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet, Pascal Voldoire estas. Novaj informiloĵ estas en pretigado, ili estos transdonitaj al Desbrières fare de Mireĵo Grosjean ; temas pri dulingvaj dupaĝaj varbiloĵ en deko da lingvoj en malalta eldonkvanto, kaj dulingvaj okpaĝaj dokumentoj en-eo, fr-eo printitaj en eldonkvanto po mil ekzempleroĵ. Tiuj dokumentoj pretos por la Ĝenerala Konferenco en oktobro 2017 en Parizo.
 22. Opinioĵ de komitatanoĵ pri gravaj taskoj kaj strategioĵ por la nova periodo. Nenio aperas. Tamen aperas novaj agadoĵ en aliaĵ tagorderoj.
 23. Buĝeto por la jaro 2018. La kerna demando estas, kie printi nian organon IPR. Naskiĝas vasta diskuto pri strategio por niaĵ du revuoj. Problemo: IPR kaj JA nun ne estas sendataĵ kune; tamen eblas mendi kune. Ĉu doni aliron al instrumaterialoj de Edukado.net al abonantoĵ de JA? Listo de perantoĵ estu kontrolata, diras S. MacGill. Katalin: kontaktu Chuck Smith por diskonigi la revuon JA en Duolingo. Mireĵo: ĉu nova titolo por JA? Katalin: ĉu ILEI lanĉu retejon au retan kunvenejon por abonantoĵ de JA? Fejsbuk barita en Ĉinio; nomo JA jam prenita en Fejsbuk. Ĉu estu rabatprezo de *Juna Amiko* por membroĵ de ILEI por pli disvastigi la revuon JA? Katalin: se ni printas IPR-n kun sama nombro de paĝoj kiel JA, estos malpli da paĝoj; por ne perdi paĝojn kaj materialojn jare unu numero de IPR (eble la lasta) estu pli ampleksa numero; tio ankau forigos limon pri

- kontribuoj (3+1). Aprobo de buĝeto prokrastata al septembro pro la ĵusaj decidoj: prokrasto aprobata per 20 jesoj kaj 2 sindetenoj. Voĉdonoj:
- A. Aperigi IPR kiel JA (sama paperkvalito, sama paĝonombro, sama printejo en Martin, SK)? 21 jesoj, 1 sindeteno.
 - B. Formulo 3+1 por IPR (kvara numero pli ampleksa por atingi la saman paĝonombro por la tuta jaro): 15 jesoj 7 sindetenoj.
 - C. Presado en Slovakio de ambaŭ revuoj: 17 jesoj, 4 sindetenoj.
 - D. Rabato por ILEI-membroj abonantaj JA-n kaj strebo al kunmendado kaj kunsendado: unuanime akceptita.
24. Aŭskulto de raportoj de eventualaj dumkonferencaj komisionoj. Aprobo unuanima de rezolucio kongresa. Ĝi aperas en IPR 2017 3.
25. Ideoj kaj proponoj por la jaroj 2017-2018. Kiel jam menciita : nova strategio por printi IPR-n en Slovakio, por altiri pli da abonantoj por JA.
26. Diversaĵoj . Demando pri lertigado de instruistoj fare de ILEI. Aperas problemoj pri agnosko aŭ ne de malnova ILEI-diplomo. La Estraro klare asertas, ke la dato de la diplomo ne ludas rolon, la diplomo estas daŭre valida. Ĉu povus aperi listo de rajtigitaj trejnadoj? Ĉe la ttt-ejo de ILEI aperu listo de tiuj, kiuj ja posedas iujn diplomojn eldonitajn/subskribitajn de ILEI. Mirejo Grosjean klarigas, ke multaj homoj ne konsciiĝas, ke diplomo validas depende de la instanco, kiu disdonas ĝin ; la sinteno al diplomoj ne samas en la tuta mondo.

Ruben Fernandez Asensio

Rob Moerbeek

Reviziis Mireille Grosjean

2017-09-03